

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Anonctarifo: 1 kv. cm. — 1 levo;

korespondo: 1 vorto — 1 levo. Por fremdlando — duoble. Postĉekkonto No 1133

Adreso: str. Alabin, 50, SOFIA, Bulgario.

Jaro XVII

Majo-Junio 1936

9-10



Bulgario, la lando

de la fruktoj

Antaŭkongresaj pensoj

Ordinare antaŭ la kongreso ni pensas kaj pripensas multon, sed post la kongreso kvazaŭ eĉ pensoj ne restas, eĉ tiu-ĉi nia bona flanko malaperas, dum eĉ se ĝi restus, tio tute ne sufiĉus, ĉar ĝi estas elementa afero, kaj ni nepre devus aldoni novajn elementojn de agado, persisto, prudento, konservo kaj ĉefe realigo, por ke la afero iru bone.

Kun tiaj pensoj mi skizas jene niajn proksimajn devojn:

1. Aŭtoritato.

La kongreso ne estas nur festeno sed precipe serioza laboro kaj tre grava momento, de kiu dependos nia movado dum tuta jaro eĉ pli. La kongreso multon pripensas kaj faras, sed poste restas la C. K., kiu devas ĉion konsideri kaj plenumi. Pro tio la ĉefa kaj la plej grava ago de la kongreso estas elekti konvenan C. K-on kaj bone sugesti ĝiajn devojn al ĝi.

Granda penado atendas ĝin. — Nia socio estis atentigita pri la okazigo de la jubilea universala esperanto-kongreso en Sofio. Hugo Steiner venis kaj intervuis niajn ministrojn, kiuj respondis favore; niaj, aŭstraj kaj esperantistaj gazetoj skribis kaj prezentis la aferon certa. Finfine rezultis nenio, aŭ preskaŭ nenio. Kompreneble pri tio unue estas kulpa nia politika ŝancelado dum la lastaj jaroj, sed ankaŭ ni ne estas senkulpaj — ni devas scii kiel agi laŭ la momento. La C. K. per sia konsisto kaj agado devas prezenti sin kaj la movadon al ŝtato, aŭtoritatuloj kaj socio kiel io konata, certa, kredebla kaj fidinda, kiel io kun larĝa socia bazo kaj kun sufiĉe favora publika opinio. Do, mia penso estas, ke kiam ni iros al diversaj institucioj kun diversaj petoj kaj postuloj, ili devos scii kion ni prezentas, kian socian pozicion ni havas kaj „kiom ni pezas“ Aliokaze ne unu aŭ du, sed cent skribpetoj, ekspozoj kaj delegacioj nenion helpos. Kaj la konkreta afero pri la universala kongreso estas grava, tre grava kaj se ni ne sukcesos, ni kompromitos nin kaj nian landon, tie-ĉi kaj internacie. Tiu-rilate ni devas agi plu, ni devas agi pli kuraĝe kaj per-

siste eĉ aŭdace, ni devas konatigi nian socion al nia afero, precipe pri la nacia, socia, kultura kaj ekonomia signifo de la universala esp. kongreso en Sofio.

2. Delegitoj.

En tiu-ĉi kadro de pensoj ni devas ankaŭ bone pripensi la demandon pri niaj delegitoj en Vieno, kiuj bone kaj trafsence prezentu nin, kiuj sukcesu, eventuale, senkulpigi nin, se ankaŭ ĝis tiam ni nenion pozitivan povos deklari, aŭ bone klarigu la eblecojn, se estos tiaj, por sukcesigi kompromisan decidon en nia utilo, kaj fine, se ni jam certe povos inviti la kongreson por 1938, ili nepre sukcesu interesigi kaj venigi ĝin. La okazo estas tre implikita, kaj oni devas tre lerte laveli inter nia registaro kaj kongreso por sukcesi kaj ne kompromiti sin.

3. Propagando.

Unu el la plej gravaj vojoj al tio estas la preso, la ĵurnalaro, ni devas pli serioze zorgi al ĝi; ĝis nun ni preskaŭ neglektis tion, ni devas konkeri kaj utiligi almenaŭ parte ĝin, ĉar ĝi estas la oficiala publika opinio, kiu estas necesa al ni por niaj akcioj, ĉar ĝi estas la grava malŝlosilo al la kabinetoj de ministroj, de aliaj aŭtoritatuloj kaj al la publiko mem.

Krom tio la C. K. devas organizi jam bone la vivantan, la personan propagandon. Feliĉe tiu-rilate al ni ne mankas homoj. Multaj niaj samideanoj, al kiuj oni povas senrezerve fidi, laŭ sia profesio estas devigataj vojaĝadi tra tuta Bulgario. Ĝuste ilin ĝi devas utiligi, ĉar ili estas plej bone konataj ĉie en la lando, kaj ĉar pro la karaktero de ilia profesio al ili ne mankas propaganda kaj organiza kapableco. Laŭ mi ili estus la plej efikaj propagandantoj, organizantoj, enkasigantoj kaj disvastigantoj de nia organo „Bulgara esperantisto“, eĉ kun certa profito ankaŭ por ili en formo de procento k. t. p. Bone estas ankaŭ se la C. K. povos trovi unu oficialan organizanton, en la stilo de la ĉi-supre montritaj, sed kiu nur per tio sin okupos: vojaĝadi, prelegi, propagandi, organizi, abonigi, enkasigi.

Tiu-ĉi punkto estas ankaŭ tre grava kaj la C. K. devas bone priatenti ĝin, ĉar ĉiuj scias ke en Bulgario estas multaj esperantistoj, sed la asocio malplenas, malsanas. Sed pri ĉio-ĉi ni devas havi planon, sistemon.

4. Reformoj.

Eble estas urĝaj iaj reformoj en la asocio, en la statuto ktp., sed pri tio kompetentas la C. K. kaj la societestroj kaj certe ili diros ion pli radikalan. Mi ĉi-rilate povas atentigi nur pri la rigida formo de la membrokotizo, kiu nur forpelas niajn sen tio neabundajn membrojn, ĉar estas postulata en unu fojo la tuta; kaj poste estas dividata je tri — asocio, societo, gazeto — pro kio neniu el ili ricevas valoran helpon. Laŭ mi la kotizoj ne devas esti la ĉefa fonto de rimedoj, la lastajn ni povos havi alimaniere, kaj en tia okazo ni devas malpli-grandigi kaj plisimpligi la kotizon por ne embarasi la alfluon de novaj membroj. Al „Bulgara esperantisto“ ni devas doni apartan atenton, sed pri ĝi poste.

Nun tamen mi volas akcenti pri alia reformo — interna. Malfacile mi povos esprimi tion, ĉar mi ne volas esti miskomprenita, sed mi provos.

Laŭ miaj observoj kaj impresoj, dum mia pli ol 13-jara esperantisteco, la B. esp. asocio havas apartan koloron, apartan spiriton, kiu diferencigas nin de la ceteraj naciaj esperanto-asocioj. Dum en eksterlando la esperantistoj estas ordinaj civitanoj, kiu fakto proksimigas la tiean esperanto-movadon al ŝtato kaj institucioj, ĉe ni male — tio ja estas ĝenerale konata, almenaŭ la cetera publiko kaj oficiale oni tiel opinias — ĉiuj esperantistoj estas nepre iaj „stranguloj“, kio signifas, ke ili estas diversaj sektanoj, vegetaranoj, militkontraŭuloj, Dânovanoj, Tolstojanoj kaj aliaj „aŭdacaj“ tendencoj kiel komunistoj k. t. p., al kiuj jam Esperanto estas paravano, malantaŭ kiu ili kaŝe agas. Ĉiuj-ĉi „stranguloj“ ne difektas, kompreneble, la bonan kvaliton de nia movado, sed ili donas tian aspekton de strangleco ankaŭ al nia esperanto-movado, kaj tio forpuŝas la publikon de ni kaj suspektigas la oficialan regon al ni. Pro tio ni ne havas sukceson en niaj akcioj; des pli ke ĉiuj suprecititaj

„ismoj“ oficiale estas traktataj kiel ne fidindaj. Sed pri tio grandan kulpon havas ankaŭ la cititaj „ismoj“ mem, ĉar iliaj adeptoj ofte, iuj ĉiam, forgesas la neŭtralecon de Esperanto kaj „montrasiajn kornojn“, iuj eĉ tre senskrupule kaj impertinente. Mi ne volas ofendi ilin, sed mi konfesu ke ofte al ili mankas elementa prudenteco.

Tiu-ĉi stato devas esti riparata. La kongreso kaj ankaŭ la C. K. devas serioze prizorgi tion-ĉi, ĉar ĝi estas unu principa, kardinala, sortodona demando. Rimedoj estas, tamen ni devas elekti atente la plej konvenajn kaj efikajn, ĉar ni operacios sur nin mem.

Laŭ mi jene staras la afero: Esperanto ne estas ŝirmilo, rifuĝejo, azilo, paravano aŭ agitkampoj por kiu ajn tendenco. Ĉiu povas uzi kaj rajtas utiligi Esperanton, sed sub sia propra firmao; en kontraŭa okazo li agas nehoneste, malnoble kaj devas esti senmaskigita kaj forpelita. Konsiderante la delikatan situacion, en kiu ni estas, mi opinias ke en nia asocio devas superi la pura esperantismo, la kaŝuloj tute sin kaŝu, aŭ almenaŭ kiam ili agas kiel esperantistoj ili agu nur kiel tiaj. Eĉ pli, se ni volas prosperi, ni devas doni pli nacian koloron al la movado (la dogmanoj min pardonu), ĉar tio estas necesa al ni. Sed pri tio havas la parolon la kongreso. Tio-ĉi eble al multaj ne plaĉos, eble iuj, dronante en dogmoj kaj ŝablonoj, min akuzos en reakciemo, sed mi deklaras, ke nenian kaŝan celon mi havas. Mi tion opinias nur kiel esperantisto, kiu zorgas pri la sorto de nia asocio, konsiderante ankaŭ la eksterajn faktorojn, de kiuj ni dependas. En la asocio devos ekregi nova spirito kun tre larĝa ĝenerala bazo. La socio jam devas vidi, ke ni ne estas iaj sektanoj kaj kaŝitaj frakcioj de certaj partioj, sed ke ni estas serioza kaj senca movado, kiu meritas atenton, kaj de kiu ĝi kaj la lando havas nur utilon.

5. Instituto.

Grava, nobla kaj fruktodona tasko por la C. K. estos la restarigo de la Bulgara esperanto-instituto. Feliĉe ankaŭ ĉi-rilate estas favoraj kondiĉoj. Siatempe la instituto estis pripensita, kreita kaj reglamentita per koncerna statuto. Eĉ ĝi

bone komencis labori kaj donis fruktojn. Poste tamen, pro eksteraj, teknikaj kaŭzoj, ĝi latentigis. Ankaŭ la homoj, kiuj gvidos ĝin kaj ĝiajn fakojn, ne mankas. Do estas necesa nur restarigo kaj ekorganizo.

Pri la urĝa bezono de tiu instituto eĉ superflue estas paroli: drasta estas nia difektita lingvo en la buŝo de la plimulto, nia neinformiteco pri lingvo, movado kaj ideoj, la manko de spertaj kursgvidantoj ktp. ktp.

Tio estos granda morala sukceso de la C. K., kiu donos bonan reputacion kaj aŭtoritaton al nia movado. La instituto ankaŭ prenos grandan parton de la klopodo de la C. K., kaj faros ankoraŭ multon, kion la C. K., pro sia destino kaj funkcio, ne povus plenumi. Ĝi altiĝos nian kvaliton de esperantistoj, tiel multe bezonata ĉe ni.

6. Organo.

La kongreso devas pripensi kaj la C. K. realigi, ĝis la restarigo de la instituto almenaŭ, la bonan redaktadon de „Bulgara esperantisto“. Teknike ĝi jam estas tre bona. Ĝia amplekso ankoraŭ ne sufiĉas, sed tio-ĉi estas demando pri rimedoj, pri kiuj ni jam parolis. Pri ĝia enhavo kaj korekteco estas ankoraŭ multo dezirinda, sed tiu-rilate estas rimarkebla sufiĉa progreso. Tamen, en ĉiu okazo, la redaktado ne devas esti en la mano de hazarda aŭ de iu teknika persono (sekretario k. a.) de la C. K. Jam la C. K. devas pripensi kaj solvi la demandon pri aparta redaktoro, konvene klera kaj sperta. La enhavo de „B. E.“ devas esti ne hazarda sed nepre laŭsistema: aktuala, rilate al la organizo, kaj karakteriza por la bulgara menso kaj literaturo.

Ke estas krizo ĉe ni montras ankaŭ la malgranda libroeldonado, kiu egalas nulon. Dume aliaj nacioj, eĉ pli malgrandaj ol ni, havas tre bonan originalan kaj tradukan literaturon en Esperanto. Ankaŭ tio-ĉi estas prizorgenda. Iam ekzistis tiucela societo, ni devas pristudi la kondiĉojn de ĝia restarigo. Tio-ĉi estas tre necesa — Bulgario havas verkojn, per kiuj dece sin prezentos en la internacia literatura vivo.

7. Internacia vivo.

Kripla estas ankaŭ nia internacia vivo

de esperantistoj. Tion kaŭzas ĉefe la malriĉeco de niaj gesamideanoj, kiu malbligas viglan, senperan komunikadon per korespondado, per la riĉa esperanto-jurnalaro kaj gazetaro, per libroj kaj per vizitoj kaj ekskursoj. La C. K. aŭ la instituto povas kaj devas esti fokuso, kiu reflektadu la internacian esperantistan vivon tra la lando per la organo kaj per la kreata vivanta propagando. Multaj principaj organizaj kaj ideoj problemoj kaj demandoj bolas internacie koncerne Esperanton, kiuj nin tre malofte kaj malforte tuŝas; kvazaŭ ni estas ia profunda tavolo de la oceano, kien la vivigaj sunradioj apenaŭ aŭ neniam penetras.

8. Konkludo.

Multon mi jam diris, multon, tamen, en la momento mi forgesis, kion mi alifojie aŭ vi, karaj gesamideanoj, kompletigos, kio estas necesa, ĉar multon ankaŭ mi devis nevole forlasi, pro tio, ke mia artikoleto jam tro grasiĝis. Mi ne dubas, ke la societoj pridiskutigos ĉi tiujn miajn pensojn kaj la delegitoj diros sian opinion, kompletigonte kaj detaliĝonte ilin, por formuligo de unu strikta, sed detala kaj deca agadprogramo por la elektota C. K., neniam forgesante prizorgi la realigeblecon.

Vere peza estas la tasko de la C. K. sed ne neplenumebla. Ĝi devas esti precipe la ĉefa konscio de la asocio, la ideo gvidanto, kiu klare prezentas al si kio kaj kiel estas farinda, kaj plenumantoj, krom ĝi, povas esti ankoraŭ aliaj personoj kaj organoj, kiujn ĝi aktivigos. Pro tio ni devas trovi kaj atente elekti la gvidantojn de nia asocio, kiuj devas esti sufiĉe kleraj, spertaj en la esperanto-aferoj, agemaj kaj kun bona kaj fortika socia pozicio, kaj ankoraŭ — ili devos formi entute unu kapablan, harmonian kunigon, unu aktivan kernon.

Do ĉio, ĉi-supre dirita, evidentigas, ke la ĉefa objekto de mia artikolo, estas la C. K. kaj ĝiaj funkcioj. Kaj efektive la C. K. estas la ĉefa akso de nia asocio — ĉio cetera estas nur ĝiaj radoj. Ni trovu la C. K-on, kiu plenumu tiun-ĉi sian rolon! Ni ne forgesu la realigadon!

L. Marikin

ekssekretario de B. E. A.

N. R. Ni preigas la jenan artikolon sen iaj ŝanĝoj, petante la delegitojn pristudi kaj koreferi ĝin.

Maria Grubeŝlieva

VIZIO

Kiel grenad' eksplodos la novaĵ' subita:
Milit'!

Skuiĝos fundamente la montaro
Sonorilegoj tondros ja solene
kaj sur betonaj konstruaĵoj triumfplene
ekpendos trikolora standardaro...

Kaj jen: eltiros el la kelo
polvozajn naftalinodorajn
ŝatatajn uniformojn generaloj
kaj sian patrujamon
profunde en animoj ekdormintan.

Batalstandardoj flirtos ĉiuvoje
sur altaĵ stangoj alkroĉitaj,
en la vilaĝoj hundoj bojas
ekhenos la ĉevaloj jam streĉitaj...
Kun sakoĵ dorse forrapidos
la patroj, fratoj kaj la filoj...

Ekrampos longaj homaj vicoj
el ŭrboj, montoj kaj vilaĝoj...

Kaj restos la plugil' dum tempo-ĉi
en manoj de l' infanoj kaj virinoj.
Kaj poste... nigra ŝarĝa atendado,
miksita kun ŝtipetoj pano...
Vunditoj kun ordenoj bruste...
La temploj plene-pleniĝintaj
kun ombroj, sian nekredemon enkaŝintaj.

Ĉe l' kaso oni rabos la kandelojn,
eklegos pop' por mortaj, vivaj...
Dimanĉe oni iros sur la placon
ĉe ligna flora arko dankopreĝi,
aŭskulti kiel popoloj kantas
psalmaron sian kaj evangelion,
kaj kiel mem la episkopo
kompaton de sinjoro vokas...

Kaj la ĝendarmoj sur ĉevaloj promenados
inter infanoj kaj virinoj — ordon gardi...
Surmetos kaj demetos neĝkitelon Vitoŝ*),
sur pordoĵ ekfunebros nigra krepo,
ruĝados suno pro angor' kaj hont'!

Patrin' renkontos filon dum la forpermeso,
ŝi serĉos en okuloj lin rigardi,
ektremos lipoj ŝiaj pro doloro,
kiam la manon ŝi etendos
kaj kaptos la malplenan jam manikon.

La limoj de la patroland' kreskados...
sed al patrin' montriĝos ja malvasta
la haŭto mem, en kiu dio volis krei ĝin.

Trad. Ivan Dobrev

*) montaro apud Sofia.

Vedbal

KAFO AMARA

Meznokte vi kiam, ebria, revenas
al hejmo zigzage ŝancela;
kaj vento ridegas al sorto mizera
kaj ploras senluno malhela;
rapidu, rapidu, primuson preparu,
surmetu kruĉeton kaffaran
kaj dum vinvaporo alpaŝas terure
pretigu tuj kafon amaran!

Se ŝirus vi ŝian koverton koloran,
kaj blovus vin spiro frostiga —
ebria de l' lasta saluto sonora,
ne staru paleta, malvigla!

Forviŝu elkore kimerojn ĉielajn
pri nigra velur-okulparo,
sub nigra tegmento de pensoj sencelaj
pretigu tuj kafon amaran!

En vintra vespero la branĉoj jam nudaj,
kiame kun vento ĝemplendas
kaj morta fantomo tra vitroj nebulaj
al vi riverencojn jam sendas —
kun ĥaroj argentaj kaj senti' senespera
cindriĝu memoron longjaran,
savita eterne de penso kimeraj,
pretigu tuj kafon amaran!

Tradukis: Kain Tera

Panĉo Miĥajlov
(nuntempa junverkisto bulgara)

El la kolekto

„Malgrandaj rakontoj“

(Dediĉitaj al la humiligitaj kaj ofenditaj en la vivo)

La okulvitroj

Mi malŝataŝ la okulvitrojn

Ĉar ili malhelpas vidi:

1 — La malbonon

2 — La veron

3 — La malĝojon

Kaj ankoraŭ — —

forprenas la brilon kaj la belecon de
la okuloj, kiuj portas iljn.

Mi malŝatas la okulvitrojn.

* * *

La vagonoj

Unua, dua kaj tria klaso.

Kaj ankoraŭ, kaj ankoraŭ — sen fino.

Sur la densa reto de forĝita fero, ĉirkaŭ-
preninta la tutan mondon.

Unua klaso — por la kontentaj kaj ĉielaj
reĝoj.

Dua — por la ekamiĝintaj, la seruristoj
kaj la ebriaj viroj.

Kaj la tria — por la simplaj, malriĉaj kaj
ĉifonkovritaj fratoj.

En la fino: 8 ĉevaloj aŭ 55 personoj.

* * *

La vagonoj estas:

Unuj kaj samaj

Ĉie

Kaj la aksoj, kaj la pensoj kaj la radoj.

En Munĥeno,

Moskvo,

Parizo kaj

Sofio.

Ĉie

Unuj kaj samaj kiel la homo.

La haveno

Malantaŭ la ondobarilo furiozas Nigra
maro, senĉese frapas la ŝtonblokojn,
ŝaŭmas, penas renversi ilin.

Vane!

En la haveno estas trankvile kaj sen-
dangere, apenaŭ videble bukligas la mal-
pura surfaco.

Tie-ĉi kaj tie altsidiĝis grandiozaj va-
porŝipoj, velŝipoj kaj etaj lignaj ŝeloj.

Ili silente rigardas la furiozon de la
hirtiĝintaj ondoj kaj trankvile, sentreme
atendas la kvietigon, por ekiri malprok-
siman vojon, al la varmaj sunlandoj.

Ho, kial mankas haveno ankaŭ por la
homa animo, por ke en la ventegoj kaj
frenezoj de la vivo ni kaŝu en senbruo
la honoron, nian liberon kaj la mizeran
nemortantan amon.

* * *

Roko

Ĝi staras meze de la ondoj — jarcent-
tojn, alta, dentohava kaj griziĝinta pro la
suferoj de la multaj jaroj.

La akvo kisas ĝin.

Kaj la suno.

Kaj la luno.

Sed ĝi ne respondas al ili:

Ĝi silentas kaj senpartoprene rigardas:

Kiel la tempo flugas, kune kun la ven-
to, kun la birdoj kaj la homoj.

Kaj ĝi faligas po unu grajno.

Tiom!

Ree ĝi staras malvarma, dentohava
kaj fiera jarcentojn kaj jarcentojn, kiel
la homa penso.

El la bulgara originalo esperantigis:

Ivan H. Krestanov

Amo de drako

En oriento, kie iom post iom alten leviĝas arbaroza Stranĝa, kie la furioza Nigra maro eniĝas en la sekteron, staras ruinoj de palacoj kaj temploj, de turoj kaj fortikaĵoj. Facila printempa vento ŝanceletas verdajn kanojn kaj kun ilia flustro malproksimen portas fabelojn de antikvaj tempoj.

Meze de verdaj grenkampoj kaj herbejoj serpentumas kaj malrapide sin trenas rivereto. Nuda monto alten leviĝas super ili. Ĝian rokan supron kovras muskoj kaj likenoj. Nokte el la truoj en la rokoj aŭdiĝas teruraj krioj de rabaj birdoj. Malgranda dometo solece staras sur la supro kaj kiel gardostaranto observas ĉion, kio okazas proksime kaj malproksime.

Kiam varma somera nokto vualas per stela mantelo la teron, elflugas rabaj birdoj el siaj truoj, teruraj krioj aŭdiĝas en la nokta silento, la monto revenas per siaj rememoroj en la pasintecon kaj rakontas al la nokto fabelon pri la mirinda belulino Rusa, kiun drako forrabis kaj tien ĉi alkondukis.

— — — — —
Ne ekzistis dua kiel la belulino Rusa. Ŝiaj okuloj estis bluaj kiel post pluvo serena printempa ĉielo, sur kiu ŝvebas facilaj lanugaj nubetoj. Ŝiaj blondaj haroj brilis kiel oro sub la sunaj radioj. Sed malfacila kaj malĝoja estis ŝia sorto. Fajra drako loĝis en la rokoj de la monto. Lia koro ektremis, kiam li unuan fojon vidis la blondan blukulan junulinon. Ĝi forte ekbatis, eksaltis en lia brusto.

Estis vilaĝa festo. Junaj kaj maljunaj gaje dancis rondodancon. La bruliganta maja suno kliniĝadis al subiro. Subite nigra nubo falis super la vilaĝon kaj vualis la rondodancon. Ekkriegis, diskuris infanoj, virinoj, junulinoj. La nubo leviĝis al la ĉielo, malsupreniĝis al la roka

monto kaj malaperis. La vilaĝaj junulinoj ĉirkaŭrigardis — la blonda junulino Rusa forestis. La tuta vilaĝo malĝojis pri ŝi. Ŝia maljuna patrino ekvelkis kaj tage kaj nokte verŝis larmojn pri sia amata filino.

Pasis jaro. Rusa naskis filon. Oni nomis la infanon Fajrulo. La drako sendis sciigon kaj invitis sian bopatrinon, kiu kun granda peno supreniris laŭ ŝtonozaj nekonataj vojetoj. Panjo kaj filino sin premis en forta ĉirkaŭpreno. Ili nur ploris — ne povis paroli. La maljunulino ĝojis je sia filino kaj nepo, kiun ŝi ĉiam vartis. Foje ŝi ekrigardis el la groto al la kamparo. Estis mateno. Sur la herberoj la roso rebrilis per ĉiuj koloroj de la spektro. Fumo leviĝis el la kamentuboj kaj en la kamparo aŭdiĝis fluto de paŝtisto. Nostalgio ekposedis ŝian koron. Ŝi decidis reveni en la vilaĝon. Ĉe la adiaŭo ŝia bofilo, la drako, donis al ŝi saketon da karberoj, dirante: „Gardu ilin: ili portos al vi feliĉon“. Dumvoje ŝi forĵetis ilin. Reveninte hejmen, ŝi sidiĝis sur la sojlo laca kaj malĝoja. Brila ormonero ruliĝis sur la pavimo kaj tintis. Ŝi jam komprenis kiaj estis la karberoj.

— — — — —
Densaj arbustoj kaŝas malgrandan sekigintan fonteton ĉe la piedoj de la roka monto. Ĉiujare, en la tago de Sankta Georgo, antaŭ la matenruĝo, el la roko falas gutoj kaj malaperas en la verdan herbon, tiel kiel la patrino de Rusa verŝis larmojn pri sia filino. Junaj kaj maljunaj kolektiĝas en tiu tago por sin amuzi kaj rememori la historion de Rusa. Facila kaj freŝa printempa vento ŝanceletas verdajn herbojn kaj kanojn, komencas kanton pri Rusa kaj ĝin portas malproksimen al vilaĝoj kaj urboj, al kampoj, montoj, valoj.

Geranio

Ĉiuj al Tirnovo — kongresurbo
de nia XXIII-a!

Svetoslav Minkov

La domo apud la lasta lanterno

Perditaj abeloj zumas en ĝia herboriĉa ĝardeno, malbonaj katoj fugas tra la herbaĉoj, birdoj interbatalas en la foliplenaj branĉoj de la arboj.

Vespere la fenestroj de la domo apud la lasta lanterno brilas kiel malhelaj marcetoj kontraŭ la flava disko de la luno kaj gudro-ombroj ludas sur la muroj.

Tiam la fantomo aperas — blanka ombro, kiu trapasas la malplenajn ĉambrojn, malfermas la sudan fenestron de la domo kaj enrigardas la mortan noktobildon.

Kontraŭe estas la lago, en kies kvietaj akvoj brulas la steloj de la malproksimaj konstelacioj, ĉirkaŭe estas la vilaoj de la riĉaj homoj.

La fantomo staras enpenŝiĝinte en la kadro de la fenestro kaj ĝi penas rememori sian pasinton, kiu estas multkolorigita per tiom da venkaj aventuroj.

Iam la legendo pri ĝi portiĝis kun superstiĉa tremo de buŝo al buŝo kaj oni timis eĉ la lumon de la lanterno, kiu desegnas diablan manon sur la pordon de tiu-ĉi dezerta domo.

Kompreneble, la mondo ŝanĝiĝis kaj hodiaŭ neniu plu parolas pri fantomoj.

Kaj se la legendo pri fantomo malaperas, tiam ankaŭ la fantomo mem ĉesas ekzisti. Vere, ĝi povas aperi kiel pli frue, ĝi povas fari mirindaĵojn kaj enkarniĝi en plej terurajn figurojn, sed oni ne priatentas ĝin. Ĉar antaŭ ĉio, ĝi ne havas biografion.

Ekde kelkaj jaroj la fantomo de la domo apud la lasta lanterno ne travivis eĉ unu aventuron kaj tio estas efektiva malfeliĉo por ĝi.

Ĝi staras ŝlosite tutan tagon en mal-luma ĉambreto sur la subtegmentejo kaj malpacience atendas la vesperon. Kaj la vespero ekestas, la horoj pasas, neniu venas en la domon. Dum fine la kokoj ekkrias kaj la blanka ombro malaperas kun ĝemo en sian kaŝejon.

Kelkiam la fantomo malsuprenvenas en la ĝardenon kaj ĉirkaŭiras preter la arboj. Ĝi eliras al la ekstera pordo mem por timigi almenaŭ iun hundon. Sed ankaŭ la hundoj fariĝis aliaj. Ili bojas kontraŭ ĝi kiel kontraŭ ordinara pasanto, kaj iuj eĉ

turnos la voston senzorge kaj provas leki ĝiajn piedojn.

Kia sorto!

Kaj krom ĉio-ĉi la nokto mem jam perdis sian mistikan misteron.

Oni vidas dancantajn gevirojn post la lumigitaj kaj larĝe malfermitaj fenestroj de la najbaraj vilaoj.

Dekoj da gramofonoj profanas la silenton.

La sufokita voĉo el Madrid ronkas en la laŭtparolilo de radiaparato.

— — —

Unu julian posttagmezon, kiam la vendistoj de limonado dormas kun malfermitaj buŝoj sub siaj grandaj ruĝaj tendoj apud la bordo de la lago, aŭtomobilo haltas antaŭ la domo apud la lasta lanterno.

Nekonata homo malsupreniras de la aŭtomobilo — alta, dorsklinita, kun mallarĝa frunto kaj ĝisfunde tondita hararo, kiu hirtas kiel broso. Lia ruĝa vizaĝo brilas pro ŝvito, du grandaj dentoj ridegas sub lia supra lipo kaj liaj malgrandaj longformaj okuloj fermetiĝas kontraŭ la suno.

La aŭtomobilo forbruegas tra la larĝa polvoza aleo kaj la nekonata homo staras post la barikado el tri ŝtofaj valizoj, kunvolvita en ŝnuroj.

Post unu momento li malfermas la eksteran pordon de la domo apud la lasta lanterno kaj kaŝiĝas kun siaj valizoj en la fundon de la ĝardeno.

La fantomo komprenas, ke en ĝian domon venis la delonge atendata gasto. Ĝi promenas en sia ĉambreto kaj kalkulas senpacience la minutojn ĝis la ekesto de la nokto. Ĉiuj ĉeloj de ĝia etera karno tremas pro ĝojo, pripensante la proksiman aventuron.

Sube, la fenestroj de la ĉambroj estas malfermataj kaj iliaj flugiloj puŝiĝas sub la forrompitaj kornicoj, oni aŭdas piedfrapadon, la pordoj fermiĝas kun bru-krako.

La nekonatulo pasas tra la mallarĝa lignoŝtuparo kaj malsuprenvenas en la ĝardenon.

Li longe rigardas la suprojn de la arboj, super kiuj malfermiĝas la senfine blua ĉielo, kolorigita per fugantaj nubetoj, poste li kapklinas kaj pasas enpense tra la herboriĉaj vojetoj.

Liaj maldikaj brovoj etendiĝas, tranĉas lian frunton kaj enboras sin en lian akran nigran hararon.

— — —
La luno ludas kiel granda orfiŝo en la spegulakvoj de la lago.

La gramofonoj bojas al ĝia ĉiela figuro kaj superverŝas la silenton per la ĝazbandaj ondoj de la plej novaj amerikaj fokstrotoj.

La fantomo forlasas sian kaŝejon kaj vagas triumfe tra la malplenaj ĉambroj kiel ĉiuj aliaj fantomoj, kiuj priatentas la ceremonialon de siaj noktheroajoj.

Sonoras rustiĝintaj ferĉeneroj, la vitroj de la fenestroj tintas en siaj putrintaj kadroj.

Kiam la blanka ombro proksimiĝas al la ĉambro kun la suda fenestro, la pordo malfermiĝas malrapide antaŭ ĝiaj paŝoj kaj ĝi stariĝas giganta kaj malbela sur la sojlo.

La homo kun la mallarĝa frunto sidas ĉe la fenestro mem kaj skribas ion sur malgranda rondforma tablo, plenkovrita de libroj.

La homo levas la kapon, alblovite de la subita mistera vento, rigardas la fantomon, frotas siajn okulojn kaj kliniĝas denove al sia laboro.

Kaj la fantomo parolas terure kaj ĝia voĉo elvenas kvazaŭ elsub la tero:

— Kiu vi estas kaj kiu rajtigis vin ĝeni mian ripozon? Ĉu vi scias, ke jam ĉe la sunleviĝo vi ne estos inter la vivantoj?

La homo kun la mallarĝa frunto forĵetas la plumingon, etendas siajn longajn piedojn sub la tablon kaj enrigardas la flamon de la fumanta petrollampo antaŭ si.

— Ripozo . . . Ripozo . . . la nekonatulo flustras tra sia nazo. — La ideo „ripozo“ kaj „egalmezura rektolinia movo“ perdas ĉian sencon, ĉar ni ne povas konstati kun certeco, en kiu el tiuj-ĉi ambaŭ statoj troviĝas certa korpo. Tiuj-ĉi du ideoj fariĝas „relativaj“, t. e. tiaj, kiuj ekhavas realan signifon nur tiam, kiam ni parolas pri movo aŭ pri ripozo kaj sam-

tempe ni konsideras certan koordinan sistemon . . . Je-e-e-s . . .

Tiu-ĉi neatendita respondo falas kiel ĵurligo sur la fantomon kaj glaciigas ĝin sur ĝia loko. Sed tuj poste ĝi alpaŝas kuraĝe en la mezon de la ĉambro, verdaj flamoj ekardas el ĝiaj okuloj, ĝiaj manoj etendiĝas kiel radikoj kun fingroj ĝistere longaj.

— Kiel? Vi kuraĝas ŝerci min. Ĉu vi ne vidas min, diru, ĉu vi ne vidas min?

Apenaŭ nun la homo stariĝas de sia seĝo, liaj du grandaj dentoj ridetas, li frotas sian larĝan manplaton sur la broson de sia kapo kaj parolas distre:

— Jes-jes . . . Jes-jes . . . Ŝajnas al mi, ke mi vidas ion . . . kiel nebulon.

— Diablen! — tondras la kolera voĉo de la fantomo. — Vi vidas antaŭ vi ne nebulon, sed unu el la plej teruraj fantomoj, ĉu vi komprenas, unu fantomon, kiu estas same tiel reala kiel vi!

— En nenia okazo mi povas konsenti kun tio-ĉi, — la spitega gasto re diras trankvile kaj sidas denove sur sian lokon.

Li etendas la brakon al la granda ladkestoj sur la tablo, eligas el tie cigaredon, bruligas ĝin kaj ĵetas malzorge la brulantan alumeton tra la malfermita fenestro. Poste li ensorbas profunde du blujn bulojn de fumo, prenas la plumingon kaj komencas skribi, parolante laŭte:

— Ni vidu nun, en kia rilato troviĝas la ĝenerala principo de la relativeco al la privata principo, kiun ni esploris pli frue. La lasta pruvo al ni, ke priskribante la naturajn fenomenojn, ni povas uzi kun egala motivo iun-ajn el ambaŭ koordinistemoj, kiuj moviĝas egalmezure kaj rektlinie unu al la alia . . . Je-e-e-s. . . . La kvardimensia provizorspaca kontinuo posedas eŭklidan strukturon kaj la formuladon de la naturleĝoj . . .

— Do, vi ne kredas en mia ekzisto?

— la misŝanca fantomo ekploras, ferminte la kovrilon de la inkujo kaj la scienculo frapas la plumon sur ĝin.

— Ho, mia Dio, kio okazas en tiu-ĉi domo! Ŝajnas, ke ankaŭ tie-ĉi oni ne povas labori! — la gasto koleras kaj perdas la fadenon de siaj pripensoj. La tendenoj de lia vizaĝo reliefigas pro turmento.

— Nenio okazas tie-ĉi, kredis nur mian ekziston kaj mi lasos vin en paco, — petas la ploranta voĉo.

— En kies ekzisto? — la nekona-tulo demandas kaj rigardas la fantomon rekte en la okuloj.

— Jen, vi vidas min!

— He?

— Ĉu vi dubas, ke mi vivas sur la tero?

— Estas nenia dubo en tio-ĉi, ke vi ekzistas nek sur la tero, nek en la spaco. Cetere, se iam la eksperimenta scienco pruvos laŭ pure scienca vojo la ekziston de fantomoj, tiam, kompreneble, mi havos la tutan motivon kredi en tiuj-ĉi legendestaĵoj. Je-e-e-s. Eble la scienco faros ion en tiu-ĉi direkto. Iufoje oni aŭskultis la naŭan simfonion de Beethoven kaj kredis en la magia strukturo de la muziko. Hodiaŭ la scienco atomigas jam tiun-ĉi simfonion kaj subtenas la vidpunkton de Demokrito, kiu asertas, ke la ĉirkaŭanta nin realeco estas trompo de niaj sentoj. Jes, ankoraŭ antaŭ dekoj da jarcentoj tiu-ĉi filozofo rakontis, ke en la tutmondo ekzistas nur atomoj, diversaj laŭ formo kaj grandeco, sed kun plene egalaj kvalitoj kaj konsisto.

— Sed vi parolas kun mi! — la fantomo flustras, freneziĝinte pro malespero.

— Ne, tio-ĉi estas halucinacio, Disinjoro, oni vere komencas vidi koboldojn, veturinte tutajn horojn per aŭtomobilo tra kotozaj kaj malebenaj vojoj.

La homo kun la mallarĝa frunto etandas la brakon kaj oscedas, liaj malgrandaj ĉinokuloj pleniĝas je larmoj.

Li bruligas novan cigaredon, ensuĉas avida ĝian densan fumon kaj la plumo glitas elsub liaj fingroj.

Tiam la fantomo alkuras al la lasta rimedo por konvinki la nekona-tulon en sia ekzisto.

Li faras sian klasikan trikon kaj aliformiĝas en unu el tiuj lupoj, pri kiuj la mezjarcentaj demonologoj parolas per vera patoso.

Kaj jen la scienculo hirtiĝas en sveno de nekvietiga kolerego, ekprenas de la tablo pezan libron kun titolo „Iracionalaj kaj transcendentaj ciferoj“ kaj forĵetas ĝin per ĉiuj fortoj al la monstro.

La libro flugas kun etenditaj kovriloj, gluiĝas al la muro, la fantomo malaperas.

Do . . .

Tiel la fantomo ekprenas sian malnovan aspekton kaj fugas terurigite tra la ĉambrojn.

Ĝi malsuprenvenas en la ĝardenon kaj vagas preter la arboj, kies feraj folioj pezas glaciigite sur la branĉoj.

Ĝi aperas ĉe la ekstera pordo, ĉirkaŭrigardas kaj ĝiaj terurigitaj okuloj tra-legas malgrandan vizitkarteton sur la pordo — ĝuste tie, kie la malnova lanterno desegnis la manon de la diablo:

Doktoro Vartolomeo Verilov matematikisto

La fantomo staras sur la bordo de la lago kun rigardo, perdita en la malproksimo.

Ĝi ne vidas la junulon kaj la knabino en la blanka vesto, kiu iras al ĝi.

Ankaŭ la junulo kaj la knabino ne rimarkas la kavaliron de la forgesita legendo.

Ili parolas laŭte kaj ridas.

La knabino en la blanka vesto pasas tra la fantomo kaj bruligas ĝin per la bonodoro de sia internacia parfumo *Quelques fleurs — Houbigant*.

La fantomo decidis mortigi sin.

La fantomo ĵetas sin en la lagon.

En tiu-ĉi tempo doktoro Vartolomeo Verilov staras en la kadro de la suda fenestro kaj vidas arĝentan radion, kiu trahakas la akvojn kaj estingiĝas.

La doktoro proksimiĝas al sia tablo kaj skribas: „Per kia rapideco moviĝas la lumo en la tubo P, se tra tiu-ĉi tubo trafluas fluidaĵo per rapideco V?”

De la eksperimento de Fiseau ni havas:

$$W = w + v \left(1 - \frac{1}{n^2} \right)$$

Do . . .

Dum la aŭtuno doktoro Vartolomeo Verilov foriras ien, forportante en siaj valizoj la manuskripton de genia verko pri la teorio de Einstein pri la relativeco.

Tia estas la historio pri la domo apud la lasta lanterno, kies fantomo vivas, eble, ankaŭ hodiaŭ en iu pli feliĉa kvara dimensio.

El bulgara lingvo tradukis G. H.

Babilajo pri Sofio

Sofio kaj la bulgaraj samideanoj ĝenerale estas indaj je pribabilo.

Oni certe ne povas promenadi en sofiaj stratoj eĉ duonhoron nerenkontinte stelitan aŭ senstelan samideanon. La plejmulto el ili estas kvankam stelitaj ankaŭ „stelitaj“, tio estas neapartenantaj al societo aŭ asocio.

La sofia esperanto-societo nun posedas propran, malgrandan sed ĉarmetan etaĝeton en la centro de la urbo. Ĝi estas nomata „Esperanta domo“ — do Esperantujo. Estante esperantisto mi ekloĝis en Esperantujo kaj jam akceptas gastojn bulgarajn el la provinco. Ĝi estas tre ofte vizitata, kaj post kelka tempo oni bezonos eĉ kelkajn oficistojn por servi diversegajn interesojn de la pacaj batalantoj.

Dufoje semajne „mielvoĉaj riatingaloj“ kaj proletaj basoj kantadas „la Esperon“. La dirigento multesperanta esperantisto ĉiam esperas, kaj jam lastaj ripeticioj vere esperigas ke „la sankta sonĝo de l'homaro por eterna ben' efektiviĝos“. Kaj tiu „eterna ben'“ estas tirnova kongreso (nur diabloj forprenu tiujn malbenitajn 500 levojn).

La „gabrovanoj“ de la esperantistaro ĉiam ĝemas sub la pereiga monstro „14.000 levoj“ ankoraŭ nefinpagitaj

por la esp. domo. Kaj vere estus hontinde, ke la bulgara esperantistaro ne povus trovi la sumeton por tiel nobla celo. Almenaŭ tiuj, kiuj promenis kaj povas disponeti.

La bulgaroj ĝenerale estas treege emaj je miloj da emoj: ekskursemaj, kantemaj, babilemaj, ŝparemaj, kalkulemaj, analizemaj (speciale kiam esp. vorto aŭ frazo sonas same kiel en la bulgara lingvo aŭ inspiras ion amuzan), bozemaj, vegetaremaj kaj senfine emaj. La specialemoj de urbo Sofio povas baldaŭ universaligi se oni nur iom pli atentigas ĝin. Mi nomas ĝin ĉokolada urbo — ĉar eble duono da vendistoj estas ĉokoladvendistoj — kaj ankoraŭ kia ĉokolado? — Kun donacaj aldonajoj... Krom abundaj emecoj la bulgaroj estas ankaŭ tre istemaj. La plej multo laŭ [dire] estas ordinaj aŭ komunaj istoj aliaj eĉ istoj de Leonkora Peza profeto, de Roland, de Hitler de X, Y, Z istoj.

Sed pli bone mi finu mian babiladon, ĉar la redaktoro certe malŝatus malplenaĵojn vortojn kvankam salono de Slavjansko druĝestvo estis mistike malplena dum mia parolado pri realeco en mistika Hindujo. Jes, certe multe da mistiko ekzistas ankaŭ en Bulgario.

A. Poŝka

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro Dolla Henri, place Victor Hugo, Togolin (Var) — Francio, pri diversaj temoj.

KORESPONDEMULO!

Niaj membroj fervore deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj tra la mondo, kaj ni volonte kaj senpage enpresigos vian adreson en nian monatan gazeton „Amikoj de Esperanto“, kiu estas eldonata ekskluzive por esperanto-korespondantoj kaj libroamantoj. Sendu vian adreson senprokraste — hodiaŭ!

Abonkotizo por unu jaro: 1 svisa franko aŭ egalvaloro (sendu poŝtmandate).

Postulu specimenon!

Adreso: Amikoj de Esperanto
2 Kudan 3-ĉome, Kojimaĉi-ku, Tokio,
Japanujo.

Nekrologio

La redakcio de „Bulgara esperantisto“ sciigas siajn legantojn, ke la 21. I. j. k. en Vieno mortis nia germana samideano **ERIKO KILIAN**, aŭtoro de la verkaĵo „La mondon al ni!“

La mortinto pasigis longan tempon en Bulgario inter ni kaj lasis plej bonajn impresojn al ĉiuj esperantistoj, kiuj lin persone konis. Lia idealismo, lia sincera esperantismo, lia agado por la bono de la homaro restas, kiel ekzemplo almenaŭ, la unikaj.

Li estis talenta, multe promesanta verkisto. Lia boneco, lia animo de granda homo ŝvelos antaŭ ni eterne.

Eternan pacon al lia fluganta animo!

ЕСПЕРАНТСКИ НОВИНИ

Известие на центр. комитетъ

На повторнитѣ постѣпки на центр. к-тъ предъ Главната дирекция на желѣзницитѣ и пристанищата за по-голѣма отстъпка по случай конгреса ни въ Търново, Дирекцията отговори, че поради усиления трафикъ презъ месецитѣ юлий и августъ, на никоя организация не може да се направи по-голѣма отстъпка отъ тая по намалената тарифа.

Съ предписание № III.—21 — 535 отъ 3. т. м. Главната дирекция на жел. и пристанищата нареди до всички гари да се издаватъ на членовѣтѣ на съюза, **срещу бележки продавани по 3 лв. въ гаритѣ и членска карта съ портретъ или членска карта безъ портретъ и каквато и да е карта съ такъвъ**, отъ 16. до 19. юлий по два билета по такситѣ на намалената тарифа до Търново, които ще важатъ и за връщане отъ 22. до 26. вкл. с. м. следъ като се завърятъ на гара Търново. За връщане бележката трѣбва да бѣде завѣрена отъ секретаря на съюза, че лицето е присъствувало на конгреса.

Увѣрения за пжтуване не ще се изпращатъ.

— Както вече е известно, ЦЕА — komitatanoj сж решили да премѣстятъ централното седалище на ЦЕА въ Лондонъ, а голѣмата библиотека да пренесатъ въ Виена. На това решение се противопоставятъ много есперантисти — членове на ЦЕА — отъ цѣлия свѣтъ, които чрезъ редъ статии, публикувани въ разни есперантски списания намиратъ това решение прогивоуставно, понеже уставатъ на ЦЕА не позволява седалището на тая международна есп. организация да бѣде въ друга страна. Поради това нѣколко швейцарски съидейници сж подали до сжда въ Женева протестъ противъ горното решение на комитета. Сждътъ до разглеждане този протестъ е издалъ временно решение, съ което забранява премѣстването на архивата и библиотеката отъ Швейцария.

— Унгарската есп. федерация урежда предъ и следъ конгресна екскурзия до Будапеща. Сжщата е получила отъ дирек-

цията на панаира хубаво изложбено мѣсто въ срѣдата на панаира.

— Презъ миналата година въ Холандия сж били публикувани 2300 статии за есперанто въ 142 различни вестници и списания. По настоящемъ 16 всѣкидневни, 12 седмични и 5 месечни вестници и списания редовно излизатъ съ специална есперантска рубрика. Това говори за голѣмия интересъ на обществото къмъ есперанто, а сжщевременно и за съдействието, което холандската преса дава на есперантиститѣ.

— Сжщо презъ миналата година въ Норвегия сж публикувани 900 статии за есперанто въ различни вестници и списания.

Маршътъ на есперанто въ училищата

Гърция: Въ островъ Самосъ, есперанто е въведенъ като задължителенъ учебенъ предметъ още отъ 1910. година въ всички училища. Въ Атина и Пирея сжщиятъ е въведенъ въ висшитѣ училища. Презъ 1926. година е билъ въведенъ като чуждъ езикъ въ гимназиитѣ и семинариитѣ на градоветѣ, дето е имало подготвенъ учителски персоналъ. Освенъ това есперанто се предава и въ курсове. Особено е силно движението на студентитѣ и ученицитѣ есперантисти, на чиято страна стоятъ професоритѣ Спатарисъ, Ставропулисъ и др.

Югославия: Есперанто е сжщо доста разпространенъ. Тамъ министерството на просвѣтата е дало своето съгласие да открие катедра по есперанто въ Загребския университетъ. Есперанто се преподава факултативно въ нѣкои гимназии и задължително въ Института за слѣпи въ Бѣлградъ.

Ромъния: Есперанто е задължителенъ езикъ въ Телеграфо-пощенското у-ще, а факултативенъ въ нѣкои гимназии и лицеи.

Англия: Есперанто се преподава въ 27 училища, нѣкои отъ които се стремятъ да го впишатъ и въ зрѣлостнитѣ изпити.

Франция: Лионският и Сентъ-Етиенският градски съвети както и много други сж гласували искане до френското правителство да въведе преподаването на есперанто въ училищата.

Освенъ това есперанто е въведенъ като задължителенъ предметъ въ 5 тѣ висши занаятчийски училища отъ всичкитѣ 6.

Япония: Ходътъ на есперанто е много победоносенъ. Тамъ нѣкои професори четатъ лекциитѣ си на него. На тоя езикъ се печататъ и много отъ държавнитѣ отчети. Такъвъ е напр. отчетътъ на Метериологическия имъ институтъ, който се разпраца по цѣлъ свѣтъ. Сж-шествува движение, целешо замѣнява-

нето на английския езикъ въ японскитѣ училища съ есперанто.

Donacitaj sumoj por nia esperanto-domo

- | | |
|---------------------------------|-----|
| 93. Radoslav K. Tričkov — Vraca | 60 |
| 94. Mara Saralieva — Varna | 100 |
| 95. Ane Stoicev Anev — Sofia | 50 |

De la pasinta numero 10,700

Entute ĝis 30. VI. 1936. 10,910

Estas multaj samideanoj, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne sendis sian helpmonon.

Samideanoj, ni denove alvokas vin! Ne forgesu viajn esperantajn devon kaj solidarecon! Tuj sendu viajn brikojn!

Ricevitaj libroj kaj gazetoj

Gazetoj:

Antaŭen, Аптекарска защита, Argentina esperantisto, Aŭstria esperantisto, Belga esperantisto, Братство, Bulteno de Esperanto asocio en ĈSR, Bulteno de Aŭstria esperantista federacio, Bulteno de Frateca esperanto-movado, Bulteno de Internacia scienca asocio esperantista, Bulteno de Marista ligo esperantista, Ĉeĥoslovaka radiobulteno, Човѣкътъ, Dansk Esperanto Blad, Deutscher Esperanto-Bund E. V., Esperanto, Esperanta radia bulteno, Esperantobladet, Fluganta skribilo, Franca esperantisto, Frateco, Хасковски новини, Herezulo, Heroldo de Esperanto, Hispana esperanto-gazeto, Informilo de Germana esp. ligo, Informilo de Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo, Informilo de Zamenhof instituto, Internacia veterinaro revuo, Internacia pedagogia revuo, Internacia „S. O. S. bulteno“, Italaj kronikoj pri l'turismo, Jugoslavenska poŝta, telegraf, telefon, Justice et verité, Cosmoglot, La Interligilo de l'P. T. T., La juna vivo, La kritika observanto, La militrezistanto, La mondo, La suda stelo, La suno, La revuo orienta, Le phare de l'Esperanto, Le Travailleur Esperantiste, Lingvo internacia, Lingvo libro, Literatura mondo, Народно здраве, Nia bulteno, Nia gazeto, Nia parolilo, Новъ животъ, Pola esperantisto, Portugala esperantisto, Ruĝa esperantisto, Sennacieca revuo, Sennaciulo, Su-

da kruceto, Sur posteno, Svenska Arbetar Esperantisten, Svenska Esperanto Tidningen la Espero, Tempo, The British Esperantist, Трезва младежъ, Тракиецъ, Verda revuo.

Libroj:

Esperanto-ŝlosilo estas elprovite la plej valora kaj efika propagandilo, uzata ĉiam kun plej bona sukceso por varbado de interesuloj. La nova eldono de la germana ŝlosilo, sub aŭspicioj de UEA, estas plej zorge reviziita kun modernigita enhavo, presita sur speciala facilpeza senligna papero; la prezo — por ebligi la plej vastan propagandon—ekstreme malalta.

Eldonejo de „Albrecht Dürer-Verlag“, Wien VII., Bandgasse 28 (Esperanto fako). Prezo: 5 ekz. por 1 intern. respondkuponon afrankite.

Ilustrita lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso (didakta) de Delfi Dalmau, apart. 5081 Barcelona—Hispanio.

Aŭstrio. Belege, laŭ artisma vidpunkto eldonita, 32-paĝa gvidlibro tra la lando de la XXVIII-a. Priskribas turismajn kaj kultur-historiajn atrakciojn de Vieno kaj de ĉiuj federaciaj landoj de la ŝtato. Sekvas detala listo de banlokoj, aer-kuraĉlokoj kaj someraj restadejoj, veturado sur Danubo, sporto kaj popol-kostumoj en Aŭstrio. Amaso da perfekte reproduktitaj fotoj de pejzaĝoj ilustras la tekston. Geografia karto estas aldonita.

Kolora kovrilo prezentas tirolanon kaj tirolaninon en iliaj ĉarmaj popolkostumoj. — Eldoninto: Österreichische Verkehrswerbung (Varb-oficejo de Ministerio por komerco kaj trafiko), Wien, I. Nibelungengasse 4.

Karintio Pri tiu montara kaj turisme tiom alloga federacia lando da Aŭstrio aperis tre gustoplene eldonita 16-paĝa faldprospekto kun agordeplenaj bildoj kaj ampleksa kolora montar-karto de karintiaj pejzaĝoj. Eldonis „Landesamt für Fremdenverkehr in Kärnten, Klagenfurt“.

Klagenfurt. Ankaŭ la ĉefurbo de Karintio, Klagenfurt, aperigis specialan esp-an prospekton 8-paĝan kun ĉio sciinda pri si kaj lago de Wörth, apud

kiu ĝi kuŝas. Eldonis: Städtisches Fremdenverkehrsbüro, Klagenfurt. Rathaus (Urbdomo).

Ĉiujn nomitajn gvidilojn oni sendas kontraŭ 1 respondkupono.

Universala kongreso de Esperanto
Wien, I., Neue Burg.

Warum Esperanto Warum
Deutscher Esperanto-Bund. Eldonas
Deutscher Esperanto-Bund, e. V.
Dresden.

Skribado kaj prononcado de la personaj kaj lokaj nomoj de M. Rollet de l'Isle, prezidanto de la Esperantista lingva akademio. Paris, 35, Rue du Sommerard.

Samideano, ĉu vi almenaŭ ĉiam kaj ĉiuokaze portas la verdan stelon?

Se ne, vi ne rajtas sin nomi batalanto por nia ideo.



Novaj pacaj batalantoj en niaj vicoj.
Anoj de esperanto-kurso en Varna, gvidita de
s-ano Georgi Hr. Dimov — vicprezidanto de esp. societo „Aldatro“.

NIA VIVO

✓ **Gabrovo.** Societo »Verda torĉo« renovigis sian agadon, laŭ la iniciato de s-ano Manol M. Kaŝev. Je la 7. de julio okazis ĝenerala kunveno kaj oni elektis novan komitaton: prez. Anton Kril, sekr. Ivan Ŝkodrov, kas. Stojan Ivanov, ekon. Janko Mlekov. Kontr. komitato: Ivan Matev, Donka Baleva kaj Penĉo Ĝaĵev.

La centra komitato bondeziras al la nova societo sukcesplenan kaj fruktodonan agadon.

Sofia. — De unu monato estas nia gastio nia tre bona samideano Antanas Poŝka, litovo, kiu nun revenas hejmen de Hindlando, kie li studis kvin jarojn. Tie-ĉi li restos ankoraŭ kelkan tempon por fari iujn antropologiajn esplorojn, kiu-cele nia Arkeologia muzeo disponigis al li siajn materialojn kaj bibliotekon. Samtempe li utiligos sian restadon en Bulgario por esplori kaj klarigi certajn kulturajn interrilatojn inter Bulgario kaj Litovio de antikva tempo ĝis nun kaj la influon, kiun Bulgario havas en la litova renesanco, speciale la restadon en Bulgario de la litova renaskiginto d-ro Basanaviĉus.

Ni ankaŭ bone utiligis la restadon ĉe ni de s-ano Poŝka: dum unu el niaj merkredaj kunvenoj li rakontis siajn impresojn de Hindujo, dum alia — pri la litova lando kaj popolo, poste ni aranĝis ankaŭ publikan prelegon en la salono de »Slavjansko društvo«, kiu temis: »Realismo en la mistiko de la hindu«.

— Malgraŭ la somera tempo niaj ĉiumerkredaj kunvenoj daŭras sukcese kun ĉiam interesaj prelegoj; same la supera kurso kaj la ĥorrepeticioj.

— Unu muro de nia domo estas jam destruita, kaj nun ni havas unu pli larĝan kaj oportunan saloneton.

— La 7-an de junio, dimanĉe, la sofiaj gesamideanoj havis la feliĉan okazon ĉe esti la jarfinan festenon de la blindaĵlerantoj, esperantistoj. Vera ĝuo estis por ni tiu simpatia festeneto, ni ĉiuj estis forte kortuŝitaj kaj ni forlasis ĉarmigitaj la blindajn gesamideanetojn kaj ilian gvidanton, s-ano Dimeo Kolev. Dronintaj en ĉiutagaj zorgoj, ni kvazaŭ forgesis la emocion, la altidealan flankon de Esperanto, niaj blindaj samideanoj, per siaj belaj

kantoj, ludoj, dialogoj, deklamaĵoj kaj teatraĵo rememorigis, denove montris ĝin al ni.

— Estas fondata ĉe la societo »Rondo por havigo de valoraj esperanto-libroj«, kun aparta statuto.

— Nia samideano Iv. H. Krestanov vizitis Jugoslavion, Aŭstrion, Germanion, Francion, Hispanion, Andoron, Monakon kaj Italion. (Pro la granda varmeco li forlasis Afrikon). Ĉie li estis afable akceptita kaj la gesamideanoj aranĝis paroladojn pri Bulgarujo kun bildoj, pri kiuj la loka gazetaro tre flate raportis.

✓ **Tirnov.** Societo »Lumo« vigle agadas. La societanoj kunvenadas lunde kaj solvas administrajn kaj teknikajn demandojn pri la bona aranĝo de nia XXIII-a kongreso, kiu okazos je 18.—19.—20. en nia urbo la lulilo de la esperantismo en Bulgario. Oni elektis lokan kongresan komitaton: prez. Ilija Zlatev, sekr. Georgi Donĉev, kas. Ivanka Derviŝeva kaj kons. d-ro Panajot Hitrov.

— Estas malfermita esp. kurso, gvidata de nia matnova esp. pioniro d-ro Panajot Hitrov, kiu donas bonajn rezultojn.

✓ **Varna.** — Dum la lastaj tagoj de aprilo vizitis nian urbon 20 geslovenoj el Ljubljana (Jugoslavio). Ĉefgvidanto estis s-ro Vekoslav Buĉar, nia samideano. La akcepto estis kora, frata. Ĉiuj restis treege kontentaj kaj esprimis deziron viziti denove Varna'n dum la somero.

— La 2-an de majo la granda slovena ĵurnalo »Slovenski narod«, aperanta en Ljubljana, publikigis la leteron de s-ano Georgi Ĥr. Dimov, adresita al s-ro Joze Kozlevĉar, prezidanto de Esperanto klubo kaj prezidanto de la kongresa komitato en Ljubljana. Laŭ letero, ricevita el Ljubljana la presita letero vekis grandan eĥon, inter la publiko kaj inter la esperantaj rondoj.

— Dum la somero ĉiumerkrede je la 7-a h. ĝis la 9-a vespere okazas la regulaj kunvenoj de la tiel nomata »Rondo esperantista«, kie ni parolas, legas, ŝercas nur en Esperanto. Por pliinteresiĝi la anojn oni komencis eldoni »Vivanta ga-

zeto«-n, en kiu partoprenas ĉiuj gesamideanoj.

— Komencis la bansezono. Alvenas multaj fremdlandanoj, inter ili estas esperantistoj. Ĝis nun vizitis la urbon jenaj gesamideanoj: s-ro profesoro Metzner, germano el Leitmeritz Ĉ. Ŝ. R.; f-ino Tanja Metelkova el Praha; e-to-familio Rudolf Štaf kun edzino kaj filo el Moravska Ostrava; s-ro Josef Rulf, ĉefagento de ĉeĥaj ŝipagencioj el Svištov kun sia filino.

— La societo ĉiutage ricevas multajn leterojn el eksterlando de samideanoj, kiuj interesigas pri nia urbo kaj lando. Al ĉiuj oni sendas la novan prospekton «Varna» — presita en E-to. La kurortdirekcio eldonis ankaŭ ĉi-jare esperantlingvan prospekton pri Varna. Oni oficiale raportis, ke la esperantaj prospektoj vekis grandan intereson en eksterlando kaj, malgraŭ la pli granda eldonnombro, la prospektoj elĉerpjgas pteĵ frue.

— Ofte por la gastoj-samideanoj oni aranĝas amuzvesperon ĉe iu samideano, kie oni prezentas al la gastoj bulgaran muzikon, dancon, kantojn kaj literaturon; kelkfoje la gastoj estas akompanataj de konatuloj ne esperantistoj, kiuj fine estas gajnitaj por nia ideo, ĉar oni konstatakas kaj eksentas la neceson de help-lingvo kiam estas ekster la patrujo . . .

— Oni regule kolektiĝas ĉe s-ino Maria Saralieva, kiu posedas modernan kaj fortan radiaparaton kaj aŭskultas la esperantajn dissendojn. Oni ĝis nun aŭskultis la malfermon de la IX-a jugoslava kongreso el radio Ljubljana, la »Verda stacio«, radio Brno, Warŝava kaj alia.

— La prezidanto de la societo s-ano Petrov estas en la programkomitato de radio Varna. Por la unua tempo oni proponis al ni 6 horojn.

Мнението ми за есперанто е, че той е най-свѣ ршенниятъ до днесъ езикъ, създаденъ съ цель да сближи човѣчеството и да го направи по-достъпно за общочовѣшки ценноости.

ИВ. ВАЗОВЪ

Български есперантски съюзъ доставя следнитѣ издания:

1. Kurso de Esperanto por bulgaroj, VII. eldono, de At. D. Atanasov	25 лв.
2. Възможенъ и нуженъ ли е межд. пом. ез. огъ д-ръ Ив. Д. Шишмановъ	4 „
3. Есперанто отъ д-ръ Ив. Д. Шишмановъ	2 „
4. Есперантски синтаксисъ отъ Зах. Захариевъ	22 „
5. Есперанто ще завладѣе свѣта отъ д-ръ Д. Гаврийски	12 „
6. За международния езикъ (анкета), съставилъ Ив. Х. Кръстановъ	5 „
7. Речникъ на Есперанто отъ Ив. Х. Кръстановъ	75 „
8. Bulgara antologio	75 „
9. Albumo de bulgaraj geesperantistoj, съставилъ Б. Октомврийски	30 „
10. Esperanto-korelativoj, съставилъ Рад К. Тричковъ	5 „
11. 3-та конгресна речъ на д-ръ Л. Л. Заменхофъ	2 „
12. 4-та и 5-та конгресни речи	2 „
13. Практична граматика на международния езикъ Есперанто	3 „
14. Международната конференция за общъ търговски езикъ въ Венеция	5 „
15. Есперанто-български разговорникъ	5 „
16. Портрети на д-ръ Л. Л. Заменхофъ (голѣмъ форматъ)	15 „
17. La espero (есперантскиятъ химнъ — текстъ и ноти)	3 „

Поржкитѣ се изпълняватъ въ предплата.

Сумитѣ превеждайте чрезъ пощ. чекова смѣтка 1133.

Адресъ: Бълг. есперантски съюзъ, Алабинъ, 50, София.